


# La Espero

2007:6



## Baldur Ragnarsson Nia kandidato por la Nobel-premio

Esperantlingva Verkista Asocio (EVA) nomumis Baldur Ragnarsson el Islando kandidato por la Nobel-premio de literaturo.

En tiu ĉi literatura numero de La Espero vi povos legi unu el liaj originalaj poemoj, kiu la unuan fojon publikiĝas. Vidu sur paĝo 3.

## La stelo Betlehema

En okcident', ho stel'  
Ekbruligita,  
Lumu sur la ĉiel'  
Senkovrigita!  
Vin la paŝtista ar'  
Sekvas volema,  
Stel' Betlehema.

Nokt' super Juda land',  
Nokt' super Zion, -  
Ĉe l' okcidenta rand'  
Mortas Orion.  
Dormas l' infan' en pac'  
En la dometo,  
Kaj la paŝtist' en lac'  
Sur la monteto; -  
Vekas de l' voĉoj ĥor'

Ilin miranta,  
Lumas en nokta hor'  
Stelo brilanta.  
Por la Edena cel'  
Homoj foriras,  
Vojon en nokt' la stel'  
Al ili diras  
Tra la bariloj for  
de la vivado  
Ĝis la pordeg' el or'  
De l' feliĉado.  
Tie anĝeloj jam  
Brakojn etendas  
Kaj el la buŝ' en am'  
Vokon alsendas:  
"Montras ne for la stel',  
Hejmen nur ĝia cel'!"

Vin la paŝtista ar'  
Sekvas volema,  
Stel' Betlehema.

Teksto: Viktor Rydberg  
Tradukis: Sigurd Agrell

Sigurd Agrell (1881 - 1937) estis sveda poeto kaj pro feso pri slavaj lingvoj ĉe la universitato de Lund. Sed li estis ankaŭ esperantisto, kion nur malmultaj scias. Li estis nur 15-jara, kiam li en 1896 ekabonis la tiam solan esperantogazeton "Lingvo Internacia". Lia nomo aperas kiel numero 1 en la listo de abonantoj. En la decembra numero de tiu jaro aperis lia unua poeziaĵo, traduko de "Birdoj migrantaj" de la sveda poeto E.J. Stagnelius.

Sekvis pliaj tradukaĵoj. Tiu ĉi aperis en L.I. 1900:2. Esperanto tiam ankoraŭ ne estis matura literatura lingvo.

Atentu ke la teksto de La Stelo Betlehema estas traduko de sveda praversio, kiu ne kanteblas per la nun ege konata melodio.

## LA ESPERO

### Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694  
Novembro 2007 • 95-a jarkolekto  
Fondita en 1913

**Redaktion:** Leif Nordenstorm

#### Frågor om prenumeration o. dyl.:

Esperanto-Centro, Vikingagatan 24,  
113 42 Stockholm, tel. 08-34 08 00

**E-post:** [esperanto@globalnet.net](mailto:esperanto@globalnet.net)

**Ansvarig utgivare:** Leif Nordenstorm

**Utformning:** Omnibus Typografi & Leif Nordenstorm

**Tryck:** Al-fab-eto, Skövde

**Prenumeration 2007:** 200 kr.

Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften. Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

## ESPERANTOFÖRBUNDET

**Adress:** Esperanto-Centro,  
Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,  
tel. 08-34 08 00

**E-post:** [sef@esperanto.se](mailto:sef@esperanto.se)

**Nätsida:** [www.esperanto.se](http://www.esperanto.se)

**Öppettider:** Esperanto-Centro har flexibla öppettider dagtid. Ring i förväg!

**Postgiro:** 20 12-3, Esperantoförbundet

#### Medlemsavgift 2007:

Direktansluten medlem 200 kr.  
Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU, Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.  
Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av *La Espero*. Tilläggsexemplar kostar 100 kr/år).

## ESPERANTOFÖRLAGET

**Adress:** Masthuggsliden 1, 413 18 GÖTEBORG  
**Postgiro:** 578-5 **Nätsida:** [www.algonet.se/~eldona/](http://www.algonet.se/~eldona/)  
**E-post:** [eldona@telia.com](mailto:eldona@telia.com) **Telefon:** 031 - 12 05 94.

## ESPERANTOGÅRDEN

**Adress:** Esperanto-Gården, 680 96 Lesjöfors,  
**Nätsida:** [www.e-g.se](http://www.e-g.se) **E-post:** [egarden@esperanto.se](mailto:egarden@esperanto.se)  
**Telefon:** 0590-309 09

### Manus till La Espero

sänds till Leif Nordenstorm, Järnvägsgränd 11  
961 76 Boden, tel. 0921-123 54  
e-post: [esperanto@globalnet.net](mailto:esperanto@globalnet.net)

	Stoppdatum	Utkommer senast
Nr 1	15 januari	15 februari
Nr 2	28 februari	30 mars
Nr 3	30 april	31 maj
Nr 4	15 augusti	15 september
Nr 5	30 september	31 oktober
Nr 6	31 oktober	30 november

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har brådskande information som måste komma ut senast ett visst datum bör ta kontakt med redaktören i god tid innan.

## NI PREZENTAS

# Bertil Andreasson

*Kie vi naskiĝis?*

Mi naskiĝis en Sjöbo, Skanio.

*Kie vi loĝas?*

Mi loĝas en Hörby.

*Pri kio vi laboras?*

Mi dum pli ol 40 jaroj laboris kiel instruisto, sed nun mi estas pensiulo.

*Kiujn interesojn vi havas krom Esperanto?*

Mi interesas min pri vojaĝoj kaj nuntempa historio.

*Ĉu vi havas familion?*

Jes, mi havas edzinon, Lisbet, kaj du plenkreskajn infanojn, filo kaj filino, plus 5 genepojn.

*De kiam vi interesiĝas pri Esperanto?*

Ek de 1956, kiam mi renkontis mian edzinon, kiu jam de infanaj jaroj estis esperantisto.

*Ĉu vi havis aŭ havas iujn taskojn en la Esperanto-movado?*

Mi ne plu havas esperantajn okupojn, sed pli frue mi dum kelkaj jaroj estis membro de la estraro de SEF, dum direkto de la Sveda Esperanto Instituto. Mi ankaŭ dum preskaŭ 20 jaroj estis sekciestro de la Sveda Sekcio de ILEI kaj membro de la estraro de la internacia ILEI (kasisto) dum 18 jaroj.



*Kiu estas via preferata libro en Esperanto?*

Mi ekzemple ŝatas "Faktoj kaj fantazioj" de Marjorie Boulton kaj diversajn verkojn de Špomenka Štimec.

*Ĉu ekzistas aliaj interesaĵoj pri vi?*

Mi dum multaj jaroj havis diversajn postenojn kaj en faka organizo po instruistoj kaj en la Sveda eklezio.

Skribe intervjuis: **Leif Nordenstorm**

## Vortoj de la redaktoro

Estimataj samideanoj!

Kiel promesite tiu ĉi numero de *La Espero* estas literatura numero. Esperanta literaturo estas interesa fenomeno. Ĝi montras ke Esperanto estas vivanta lingvo. Se oni legas malnovan Esperantan literaturon, kiel ekzemple la tradukon sur la unua paĝo de tiu ĉi numero, oni sentas ke Esperanto nun estas multe pli matura ol dum ĝia juneco. La lingvo evoluis, evoluas kaj evoluos! Ĉu ne? Tamen malnovaj tekstoj en Esperanto restas tute kompreneblaj por ni.

Esperanta literaturo estas interesa ankaŭ pro alia kialo. Multaj esperantistoj komencas verki en Esperanto. Eble multe pli granda ono

de la esperantistaro ol la nombro de svedoj, kiuj verkas en la sveda lingvo. Ĉu la lingvo vekas kreemon en la esperantistoj? Aŭ ĉu la ebleco per Esperanto sendi tekstojn al alilandaj revuoj igas esperantistojn verki?

Do, legu la literaturaĵojn en tiu ĉi libro. Eble vi emos plulegi. En *La Espero* 2007:5, kiu aperas samtempe, vi povas vidi anoncon pri aliaj libroj. Eble vi ion aĉetos por legi dum la kristnaskaj ferioj.

Ĉion bonan deziras

via redaktoro

## Paŭzaj momentoj

Sesdek jaroj pasis; kaj li forpasis  
 jam antaŭ jaroj, malnova kamarado  
 de miaj junaj jaroj de manlaboro  
 pri tero, ŝtonoj, per pioĉo, ŝovelilo  
 en fora valo islanda, apud rivero  
 glacie griza, pezbrue fortoflua.  
 Homo malalta, nature senpretenda,  
 vojlaboristo, stabila, meditema,  
 amanto de sia pipo, homo saĝa.  
 Dum tri someroj ni laboris kune  
 en grupo de kunuloj memorindaj,  
 ŝovelis postprintempe kun fervoro  
 neĝajn amasojn de pasinta vintro  
 sur montara vojo kondukanta norden  
 tra regiono dezerta, salubre ŝvitis  
 inter muroj de glacio, plene alvide  
 al montoj majestaj vice situantaj  
 sur la blua horizonto sub sereno.  
 Paŭzojn ni havis, tiam li trankvile  
 starigis sur la neĝo la ŝovelilon,  
 eltiris sian pipon, taŭge malpompan,  
 enŝovis nigran tabakon en la kaveton  
 pipokapan, uzlonge malvastigitan,  
 ĝin senhaste ekbruligis, fumis  
 solene en la pura, friska aerblovo  
 de la altlanda etendovasta mondo  
 kun mano ripozanta sur la tenilo.  
 Tiel li staris trankvile pozicia,  
 dum mi junulo atendis la momenton,  
 kiam li prenos la pipon el la buŝo  
 por diri ion saĝan, kiel li kutimis.  
 Tiaj momentoj restas en mia memoro  
 kiel simboloj de progreso sen trudiĝo  
 kaj senzorgo kvieteca, kiaj doniĝas nur  
 en meritita paŭzo dum laboro  
 inda je plenumo, kiel poemado.

17.9.2007

**Baldur Ragnarsson**

## Baldur Ragnarsson

Baldur Ragnarsson naskiĝis la 25-an de aŭgusto 1930. Li estas islanda instruisto kaj verkisto de poemoj, interalie esperantaj.

### Vivo

Profesie li estis instruisto kaj lerneja ĉefinspektoro. Li estas ano de la verkista asocio de Islando.

### Esperanto

Li lernis Esperanton kiel gimnaziano en 1949, kaj aktivis movade (lande kaj internacie) ekde 1952.

Ragnarsson estis prezidanto de Islanda Esperanto-Asocio dum multaj jaroj. Li prezidis la Belartajn Konkursojn de UEA ekde 1975 ĝis 1985, estis LKK-prezidanto de la UK 1977 en Rejkjaviko, kaj vicprezidanto de UEA pri kulturo kaj edukado de 1980 ĝis 1986. Li poste iĝis honora membro de UEA.

Membro de la Akademio de Esperanto ekde 1979, kaj redakciano de Norda Prismo 1958-1974, ricevis en 1964 la "Arĝentan spronon de KOKO" pro originala verkado.

En 2007, Esperantlingva Verkista Asocio elektis lin kiel kandidato al Nobel-premio pri literaturo post morto de William Auld.

### Verkoj

Ragnarsson verkis islandlingve poemlibrojn kaj fakajn librojn pri la islanda lingvo. En Esperanto li verkis du famajn poemkolektojn, nome Ŝtupoj sen Nomo kaj Esploroj. En 2007 aperis ĉe Edistudio La lingvo serena, lia plenverkaro: ĝi enhavas la du poemarojn, ĉiujn disajn poemojn, kaj ĉiujn eseojn pri diversaj kampoj de la lingva kaj literatura kulturo pri kiuj li okupiĝis.

### Poemaroj

- Ŝtupoj sen nomo, 1959
- Esploroj, 1974
- La lingvo serena, 2007

### Tradukadoj el la islanda

- Sub stelo rigida (Du poemaroj sub unu titolo de la islanda poeto Torstein fra Hamri) 1963
- Islandaj pravoĉoj (Tri rakontoj kaj unu poemo el la antikva islanda literaturo) 1964
- Sagao de Njal (La plej granda el la antikvaj islandaj sagaoj) 2003
- Sendependaj homoj (Romano de la Nobelpremiito Kristjan Laxness) 2007

## Kranio

Anonima ruino  
neglekte forlasita  
en ekstertomba fremdeco  
blinde rigardas  
en perditan pasinton  
dum la tempo laciĝas.

Formortis memoroj  
de dentodoloro  
kaj turmento postebria.  
En sola izoleco  
nur obstine daŭradas  
la objekto senrilata.

Neutila, neunika.  
Ordinara posedaĵo  
de kiu ajn  
en vivo aŭ morto.  
Nur tro substanca  
por eĉ imaga rolo  
de fantomo noktomeza.

Ne zumas penso plu  
en la sterila kavono.  
Sub ĝia volbo  
blasfeme grumblas  
histeria vespo  
trovinte  
nur malplenon.

### Stig Jacobson

**JACOBSON, Stig.** 1913. Svedo. Naskiĝis apud Skövde. Lernis Esperanton en 1934. Gvidis studrondojn. Tradukis. Eldonejo Alfabeto aperigis de li kvin verkojn kun noveloj kaj poemoj svede kaj Esperante.

## Ĉe la limo

Estas limoj inter homoj,  
estas limoj inter ni.  
Ĉu estas pro la lingvoj,  
ĉu estas pro kolor'?

Ĉi-tie ĉe la limo  
sur tero staras mi.  
En la alia flanko  
samtere staras vi.

Kiel estas viaj pensoj  
kaj via opini'?

Vi amas vian landon,  
kun via famili'?

Ĉu vi foje timas  
pro povo kaj milit'?

Ĉu la infanoj viaj  
revas pri manĝinvit'?

Ĉu vi rajtas kredi  
kaj preĝi al Jesu'?

Vi certe volas pensi  
libere pli kaj plu.

Mi volas lasi timon,  
renkonti kun respekt'  
por viaj cirkonstancoj  
kaj via dialekt'.

Ni povas kune preĝi  
por paco kaj konkord',  
forpreno de la limoj,  
malfermo de la pord'.

Jesuo, nun ni venas  
kun preĝo antaŭ vi.  
Ho, benu nian mondon  
kaj venu inter ni!

### Anna Landfors

**LANDFORS, Anna.** Loĝas en Sundsvall. Publikigis poemojn en revuoj. Laŭlegis poezion en kristanaj Esperanto-kunvenoj.

# La ombro

## Fragmento el la romano "Hans Alienus"

En Jerusalemo Hans Alienus loĝis en gastejo de primitiva speco. Lun vesperon li linge restis ĉe sia fenestreto. Kiom pezas la nura penso fermi ĝin! Varmeta aero. Trankvilas la arbo. Sube sur la nespaca nivelekurba strato venis rajdanta azenisto klinita antaŭen sur sia besto, kies hufetoj glitante tintis sur la ŝtonĝibetoj. Li kantis sunpovran kanzonon en kutima maniero de orientulo kun plenda, daŭrema naztono. Dum li foriĝis lia voĉo similis al tiu de sakfajfilo.

Sur la fenestra breto kuŝis penzorge manskribita traktaĵo, kaj la sudlanda lunbrilo de la februara nokto tiom forte lumis ke li povas facile legi la purdetalan skribon.

La traktaĵo defendis la konstantecon, la neŝanĝemon kaj ne toleris kompromison. Dum li nun tamen ĝuste en tiu urbo de kie la penso pri interfratiĝo disvastiĝis sur la tero trarigardis tiun graskorpan foliaron, li deklaris al si mem: - Ne, tute ne! Ni junaj homoj per la varmo de nia juneco nature kontraŭas al la stagnemo, jen ĝuste ni en nuno kaj pasinto preparis terenon por ĉiu vorto de vero elirinta el tiu ĉi urbo.

Parolante li senintence ekmovis manon. En sama momento la rigardo renkontis lian propran ombron kiun la lunbrilo aperigis sur la ĉambromuro proksime ĉe la lito. Senkontrolle li ekridis. Ĉu li ne vidas ombron de aktoro kun alte levita kapo kaj provoka gesto deklamante pompan frazon?

Hontoplena pro si mem li devis nun unufoje rekoni ke inter tiuj pensoj, transprenitaj el tiu ĉi urbo al la Okcidento kiel ŝipoleno de altvaloraj trezoroj troviĝas ankaŭ grajneto, nur escepte memorata perlo - la humileco.

Li premis manon al la vizaĝo kaj fermis la okulojn kaj ŝajnas al li ke miloj da steletoj ekflagras antaŭ lia vido. Certe aperigis ilin nur lia propgra pulsanta sango, sed post iom la brilpunktetoj emas halti kaj similas al tiuj vualitaj steloj kiujn li ĵus rigardis. Nur post longe vekis lin voĉoj el la strato kaj li rigardis eksteren.

Inter la domoj aliflanke de la strato entendiĝis ŝtona muro kaj sur la tero brukis fajro. Ĉe la fajro sidas Kristo ĉirkaŭata de sincera anareto kaj amikoj. Kelkpaŝe malantaŭ li aperis lia ombro grandigita sur la ŝtonblokoj

de la muro.

Kaj jen lia preferata disĉiplo Johannes distre prenas nigran karbopecon kaj per tiu sekvas la konturojn de la majstro. post tio li faligis la karbopecon kaj aktivigi sen la interparolo.

Postan matenon dum Hans Alienus denove staris ĉe la fenestra ĝiĉeto kaj vidis la homojn preterpasi, unu post alia haltis por rigardi la desegnon sur la muro.

- Jen, tio prezentas ŝuiston, ĉar kurbas lia dorso, diris ŝuisto.

- Sen senco vi frazumas, respondis la fruktovendisto. Lia antaŭen klinita pozicio ja klare montras komerciston de fruktoj, nur oni forgesis aldoni korbon sur lia dorso. Lia duonaperta buŝo evidentiĝas lian vikon: Aĉetu granatpomojn! Venu aĉeti, venu aĉeti!

Alpaŝis altranga funkcianto de la sinedrio. Dignece li ne miksis sian voĉon en la vortofluon de la ĉifonulojn sed pensis en si mem: - Per tiu alta frunto mi ja vidas ke temas pri pensanto, homo de scio. Vere eblus ja konsideri tion portreto de mi mem. Verŝajne temas pri mi. ne tute sen talento. Desegnis min kredelbe iu al la stratosvarmuloj. Plimulto el ili ja konas min.

Dume iu al la rigardantoj silente proksimiĝis al la karbodesegno. Bonvestita viro kies milda kaj bonvola vizaĝo similis al tiu de infano. Neniu vere konis lin kaj nenia kroniko poste gardis lian nomon ĉar li vivis kaŝete, fuĝante ĉian eksteran atenton. Kun manoj krucitaj sur la tenilo de lia promena bastono li rigardis la desegnaĵon. - Kia nobla frunto, li pensis. Kia pura humileco de de la persona tuto. Se oni nur iom simiulus al tia bildo - sed kial aspiri ion neeban!

Restante surloke silenta kaj humila li tiom frape similis al la desegnaĵo ke la ĉirkaŭantoj retiriĝis kaj flustrante montris al li. Surprizita kaj timida li foriris sen kompreni kial ĉies rigardo sekvas lin.

Li ne similis al Kristo, ĉar kiu povus; tute sencie li similis nur la Lia ombro. Se li tamen estus mem koninta tiun fakton kaj akcentus la certecon per fiera kapgesto - tiam la simileco estus jam for.

Verner von Heidenstam  
Tradukis: Stig Jacobson

## ANEKDOTOJ

### Multekosta benzino

Konversacias du amikoj.

- Ĉu vi scias, ke benzino tre plikariĝas?

- Mi opinias, ke tio ne tro gravas por vi. Ja vi ne havas aŭtomobilon.

- Jes, sed mi havas fajrilon!

Rusa

### Fotografisto

- Tre interesa afero, kial homoj sur fotoj de via laborejo ridas tiel senĝene?

- Vi ne mirus, se vi konus, kiel aspektas nia fotografisto.

Rusa

### Intensa kultivado

Granda kafkomercisto el Sao Paŭlo esploras la kultiveblon de la interna lando. Unu tagon, en la ŝtato Mato Grosso, li ekvidas vastan kampon, kun nur kelkaj bananarboj, kaj, sub unu el ili, dormetantan kampulon. "Diru, amiko, demandas la komercisto montrante al la vasta senkultura tero, ĉu via grundo ne donas kafon? - Ne, nenian kafon. - Ĉu kotonon? - Ne, nenian kotonon. - Ĉu sukerkanon? - Ankaŭ nenian. - Tamen, se vi plantus kafarbojn, ĉu tio ne prosperus? - Nu, kompreneble, se vi plantus ilin..."

Brazila

### Pri la aŭtoro

C. G. Verner von Heidenstam (1859-1940) estis sveda poeto, germandevena. Li gajnis la Nobelpremio de Literaturo jare 1916 kaj estis ano de la Sveda Akademio ekde 1912.

Li estis filo de oficiro. Dezirante fariĝi pentristo, li studis pentroarton en Romo kaj Parizo, sed pro sanmotivoj li devis ĉesigi la studadon. Tamen li ofte vojaĝis kaj siajn travivaĵojn literature prilaboris. Romane li revivigis la historian vivon de vikingoj.

\* Vallfart och vandringsår (Jaroj da pilgrimado kaj vagado, 1888)

\* Hans Alienus (1892)

\* Dikter (Poemoj, 1895)

\* Karolinerna (Karolinanoj, 1897)

\* Heliga Birgittas pilgrimsfärd (Pilgrimo de sankta Brigita, 1901, historia romano)

\* Ett folk (La popolo, 1902)

\* Folkungaträdet (Arbo de Folkungoj, 1905-1907, historia romano pri vikingoj)

\* Nya dikter (Novaj poemoj, 1915)

\* Sista dikter (Lastaj poemoj, 1942)

Laŭ Vikipedio

## Ĉe Narva Strato

Grigorij akompanis ŝin al la unua loko kaj helpis interpreti. Tri horojn ĉiuj aŭde matene kaj same lunde. La laboriloj estis bonaj. La apartamento havis tri grandajn ĉambrojn kaj amason da anguloj, kiuj sufiĉas kiel loĝejo por ŝi. Sed ŝi devis resti surmatrace ĉe Griŝa.

La loĝanto estis emerita majoro. Li vere aspektis maljuna, tamen iel freŝa, kredeble sana kaj forta. Tute ne odoris kiel oldulaĉo.

– Li certe senĉese gvatos min por kontroli ke mi laboras, ŝi diris al Griŝa antaŭ la unua fojo.

– Fajfu je tio, Sveta. Lasu lin gvati. Eble vi povus eksciti lin por havi pli bonan pagon.

– Ĉesu do!

Sed la majoro ŝajnis ne tro kontrolema. Li malmulte babilis, kvankam li plej ofte hejmis. Ĝi purigis en paco, kaj lunde lavis la vazojn. La pagon ŝi ricevis enmane ĉiuj aŭde. Kvarcent okdek kronojn, kio signifis kvincenton, ĉar ŝi zorgis neniam kunporti apunton. Komence ŝi trovis tion multege, sed poste, kiam ŝi volis sendi ion hejmen al panjo kaj Anna, ŝi spertis kiel malmulte tio estas, kvankam ŝi baldaŭ ekhavis duan lokon. Kaj kvankam Griŝa ne postulis monon por gastigi ŝin.

Forirante ŝi enmemorigis la adreson por esti certa retrovi ĝin. Narva Strato n-ro 20. Jen vere stranga koincido. Ĝi demandis sin, ĉu Griŝa serĉis specife ĉe tiu strato, sed kial li farus tion? Li ne estis Narvano. Sendube tio estis pura hazardo, sed ŝi trovis ĝin bona signo.

La dua loko samstrate estis tute alia. Plena familio. Oni klare rimarkis, ke tie la virino mastras la hejmon. Ĝi aspektis kvardekjara, tamen bela kaj elegante vestita. La viro ŝajnis pli juna. Li ne partoprenis en la interparolo.

– Bone do, Svetlana. Vendrede, kvar horojn. Fridays, okay? De tagmezo ĝis la kvara. Jen mia filo Orvar, kiu aĝas ok, kaj kvinjara Anna. Kaj jen mia edzo Fredrik. Mi mem nomiĝas Pia.

Sveta rigardis la knabinecon.

– Knabino Anna, ĉu? Mi ankaŭ knabino Anna!

– Pardonu? Ĉu vi volas diri – ĉu vi havas filinon? You have a daughter?

– Yes! Knabino. Doĉ. Ĝi ankaŭ kvin. Five year.

– Ha! Precize kiel nia Anna! Nekredeble! Ĉu ŝi estas kun vi en Svedio?

Sveta ne komprenis kaj skuis la kapon.

– Is she here in Sweden? Stockholm?

– No, no. Ĝi en Estonio. Mia patrio en Narva.

La virino turnis sin al sia filineto.

– Ĉu vi komprenis tion, Anna? Ankaŭ Svetlana havas knabinon, kiu nomiĝas Anna kaj havas vian aĝon.

Sed ŝi vivas ĉe sia avino en Estonio. Ankaŭ la knabo volis atenton.

– Mia paĉjo loĝas en Anglio! li diris al Sveta.

– Ne kamprenas. Patro Anglio?

– Jes, mia vera patro loĝas tie. Fredrik estas mia vicpatro.

Supozeble tio signifis, ke la virino edziniĝis duafoje. Sed kiel strange renkonti kvinjaran Anna ĉi tie! Ankaŭ tio estis bona signo. Tamen sveda Anna aspektis pli aĝa ol ŝia Annuŝka. Espereble ĉio estas bona pri ili hejme. Se panjo nur estas sana kaj Anna ne tro malobeemas.

Kiam ŝi venis vendrede tagmeze por purigi, kutime nur la edzo estis hejme. Li laboris ĉe komputilo. Poste kelkfoje Orvar revenis de sia lernejo, kaj fine aperis Pia kune kun eta Anna kaj amaso da sakoj el mangobutiko. Sed tiam estis tempo por Sveta ricevisian pagon kaj foriri.

Ŝi ĉiam facile lernis lingvojn. Tamen daŭris tri jarojn por trapasi la lingvoekzamenon. Tri jarojn antaŭ ol ŝi povis peti civitanecan. Kaj ĉiuj paperoj, kiujn necesis akiri de buroaj limakoj. La naskiĝatesto por pruvi ke ŝi naskiĝis en Estonio. La atesto, ke ŝi estas nepunita de tribunalo. La dokumento de identeco. Poste finfine ŝi povis akiri la pasporton, la bluan kun leono. La ŝlosilon al la cetera Eŭropo. Ĝi planis unue serĉi laboron en Helsinko, pensante ke oni tie komprenos ŝian pene lernitan estonan lingvon. Sed la du vizitoj ne donis bonan impreson. Ŝi ne komprenis ilin, kaj ili ne havis paciencon aŭskulti, kion ŝi volas diri. Tie ne gravis la koloro de ŝia pasporto. Ŝi estis nur unu el amaso da rusoj, kiuj volis gajni kelkajn eŭrojn. Tiam iu diris al ŝi, ke Grigorij Malkov estas en Stokholmo, kaj ŝi sukcesis kontakti lin. Li memoris ŝin de la teksfabriko kaj akceptis helpi ŝin, se ŝi faros la vojaĝon. Griŝa laboris en resto-

racio, kaj ŝi esperis trovi laboron tie. Li dividis antaŭurban loĝejon kun Jurij kaj Larisa, du geedzoj el Rusio. Ŝi ricevis matracan por dormi en lia ĉambro.

– Sveta, venu al mi enlite.

– Ne, mi volas dormi.

– Kompreneble vi dormos. Sed ĉi-supre estos pli agrable por vi ol sur tiu matraco.

– Mi estas laca. Lasu min en paco. Tiam li anstataŭe venis suben al ŝi. Ŝi ne vere kontraŭis tion, tamen ne plaĉis al ŝi ke li rigardas tion memkomprenebla. Li povus almenaŭ diri ion pozitivan. Ke ŝi estas bela. Aŭ alloga. Almenaŭ ion. Ne simple "jen venu", kvazaŭ al hundo.

Tamen li pravis, ke la lito estas pli komforta. Do ŝi alkitimiĝis. Sed restoracian laboron ŝi ne ricevis. Anstataŭe li metis slipojn sur arboj laŭlonge de strato, kie loĝis riĉuloj. Jen kiel ŝi trovis la majoron kaj la patrinon de sveda Anna.

Eksciante, ke ŝi venas el Narva, la majoro vigliĝis.

– Ĉu el Narva? Diable! Ĉu hodiaŭ io restas de la fortikaĵo?

– Ne kamprenas forkaĵo.

– Fortikaĵo. Kastelo. Castle, fuorto.

– Aha, zamok! Jes, jes. Granda forkaĵo. Malnova.

– Ha, do, vi venas de tie, knabine-to? Ĉu vi scias, ke ĝi iam estis sveda, Narva?

– Jes, scias. Sveda armija granda, granda kampanija en Narva. Sed caro Pjotr granda armija, prenas Narvu.

La majoro alportis dikan libron kaj elserĉis mapon, kiu ŝajne temis pri iu milito en Narva. Li gurdis pri sia dekdua Karlo kaj Petro la Granda, kaj amason kiun ne eblis kompreni. Al li tio ŝajnis esti sveda venkego. Tamen laŭ ŝia kompreno, caro Petro konkeris Narvon de la svedoj. Sed ŝi neniam kontraŭdirus al majoro. Se li kredis ke Svedio venkis, do li kredu tion. Sed tiuokaze ŝi hodiaŭ estus svedino. Eble tiam ŝi ne bezonus purigi ĉe emerita majoro en Stokholmo.

Ŝi pensis, ke li eble vigliĝos tiugrade, ke li petos specialan servon. Ŝi demandis sin kiun pagon li ofertos. Efektive li estas sufiĉe alloga, eleganta sinjoro. Unuafoje ŝi renkontas iun kiel li. Sed la militmemoroj ŝajne ne ardiĝis lin tiel. Ŝi ne sciis, ĉu li iam estis edzo. Eble li estas vidvo kiu ankoraŭ sopiras je sia edzino.

Vendrede, reveninte el la infanejo kun sia patrino, sveda Anna ĉiam klopodis venigi Svetlanan en sian ĉambron por montri al ŝi siajn pupojn. Ŝajne la patrino ne kontraŭis tion. Generale ŝi ne estis severa mastro. Anna babiladis kaj prezentis etajn scenojn per siaj pupoj. Komence Sveta komprenis malmulte, sed ŝi rapide lernis. Sveda Anna estis sufiĉe sperta,

### Noto de la redaktoro:

Komencantoj pri Esperanto atentis ke en tiu ĉi novelo troviĝas ne nur esperantaj vortoj, sed ankaŭ anglaj kaj rusaj vortoj kaj kelkaj esperantaj, kiuj estas misprononcitaj kun rusa akcento.

### Pri la verkisto:

Sten Johansson, produktema sveda Esperanto-Verkisto. Plu profunda prezento aperis en La Espero 2005:2.

kompare kun ŝia filino. Ekzemple ŝi sciis bone legi, do Sveta konatiĝis kun sveda teksto en kelkaj infanlibroj. La vortoj ne ĉiam aspektis, kiel ŝi atendis aŭdante ilin. Sed la plimulto estis deĉifrebla. Feliĉe ŝi sciis legi estone. Ja temis pri la sama alfabeto, pli-malpli. Iutage Pia havis ideon.

– Anna havas tiom da ludiloj, kiujn ŝi neniam uzas. Kion vi pensas, Svetlana, ĉu ĝenus vin se ni kolektus iom en paketo por sendi al via knabino en Estonio?

– Ĉu paketo? Al Anna?

Kiam ŝi komprenis kaj akceptis, la ideo montriĝis malfacile plenumbla. Ĉio, kion oni prenis el kestoj, estis la plej kara aĵo de sveda Anna. Fine Pia ĉesigis la klopodojn.

– Ni atendu. Mi mem aranĝos tion poste.

– Panjo, vi ne rajtas donaci malnovan Urseton! Mi estos vere malĝoja!

– Ne, li do restu. Sed vi mem povas elpensi ion, kion vi volas sendi al estona Anna.

Ŝi turnis sin al Sveta.

– Aŭ ĉu ni diru rusa Anna?

– Ni loĝas en Estonio kaj ni rusaj.

– Sed kio vi estas plej multe? Kiel vi sentas vin?

– Ni ne pensas tiel. Lando unu kaj – kiel oni diras – nacio alia. Ne sama afero.

Pia ne montris, ĉu la klarigo kontentigas ŝin. Jen kiel estis ĉi-lande. Homoj preskaŭ ĉiam kondukis ĝentile, sed ne eblis vidi, ĉu ili efektive estas kontentaj aŭ malkontentaj, kole-regaj aŭ feliĉaj. Eble ili mem vidis, sed por Sveta ne eblis tion distingi.

Post semajno Pia flustris, ke ŝi pretigas paketon. Sed ne necesas montri al Anna kion ŝi sendos.

Post ilia interparolo pri rus-sveda milito ĉe Narva, la majoro iĝis pli amikema. De temp' al tempo li ŝercis. Unufoje li donacis al ŝi botelon da ŝaŭmvino. Ĝi demandis sin, kion li atendas reciproke, sed li nenion aludis.

Iulunde li malfermis vestite en negliĝo el vinruĝa, silkeca ŝtofo, kiun li kuntenis mane ĉe la brusto. Li konfuzite rigardis la manartikon, kie mankis horloĝo. Li tamen remastris sin, enlasis ŝin kaj malaperis dormoĉambren.

Troviĝis pli ol sufiĉe por fari kuireje. Sveta forĵetis rubon, skrapis manĝorestaĵojn, verŝis akvon en la lavpelson. Poste ŝi trovis glasojn, botelojn kaj plenplenan cindrujon en la salono. Survoje reen kun la purigita cindrujo ŝi koliziis kun knabo.

– Izvenite! ŝi diris aŭtomate. Par-donan!

La knabo rigardis ŝin kun surprizo sed nenion diris. Tamen io en lia rigardo ŝajnis hejmeca. Same en la vizaĝo, tiu larĝa, kaj la malhelblonda

hararo. Li aspektis apenaŭ dekokjara. – El kie vi venas? ŝi diris ruse.

Li rigardis dorsen. La dormoĉambra pordo estis fermita.

– Ĥarkovo. Kaj vi?

– Narva en Estonio.

– Li certe ne ŝatus ke ni interparolu, diris la knabo.

Ŝi pripensis.

– Kial ne? Li estas afabla.

La knabo paŭtis. Tamen li diris nenion pluan sed iris al la pordo, malfermis kaj trairis.

– Ĝis iam, eble, li diris fermante la pordon.

Fredrik, la patro aŭ vicpatro de sveda Anna, ekkutimis elpaŝi el sia laboroĉambro por oferti bieron. Ili sidiĝis sursofo, kaj ŝi vidis lin ekzameni ŝiajn kruojn. Tion li ja rajtis. Nenio mankis al ili. Ŝi esperis ke daŭros longe ĝis ili iĝos kiel tiuj de panjo.

– Kie vi loĝas en Stokholmo?

– Albi.

– Kion vi diris? Ha, Alby. Tio estas sude, ĉu ne? Ĉu sola?

– Ne, kun viro de Estonio kaj du de Rusio.

– Viro? Ĉu via edzo? La patro de via filino?

– Ne, ne. Li nur amiko. Mi kaj li laboro fabrika en Estonio.

Ŝi rekonis la esprimon en liaj okuloj. Tamen estis io malvarma en lia rigardo. Ĝi ne aparte surpriziĝis, kiam iutage li ŝteliris al ŝi en la vestiblo kaj karesis al ŝi la sidvangojn. Ĝi rektigis la dorson kun ŝvabrilo enmane kaj turnis sin kontraŭ li.

– Kio volas?

Li ridetis superece, ŝajnis. Tamen li ne renkontis ŝian rigardon sed gapis suben al ŝia bluzo. Kaj jen li forte ekpremis ambaŭ ŝiajn mamojn.

Ĝi retroiris unu paŝon.

– Ne! Mi purigas. Laboras puriga. Ne alia.

Li revenis apud ŝin.

– Ne estu tiel malema! Vi ja havas tempon por iom da plezuro. Ĉio jam estas pura, ĉu ne? Vi havos alion por fari. Je kiu aĝo vi naskis vian filinon?

Li kaptis ŝian brakon, sed ŝi ŝire liberigis sin.

– Ha, ĉu tio ne plaĉas al vi? Ĉu vi eble volas pagon? Kiom vi kutime prenas?

Ŝi ne respondis, nur staris atende.

– Diru kiom vi prenas! Krome, tio estas. Vi jam ricevas por labori ĉi tie. Ŝi sentis momenton da hezito. Kiom li pretos pagi por kuŝi kun ŝi? Eble kvincent? Tamen ne mil, certe. Sed kvincent ne estas multe, kaj li estas tiel abomena. Ne, ŝi ne faros tion. Ne kun li. Eble, se temus pri la majoro. Sed ne kun la patro de sveda Anna, la edzo de Pia. La vicpatro, kiel diris Orvar.

Ŝi duafoje retropaŝis.

– Ne. Nur purigas. Ne alia.

– Mi montris al vi kie purigi. Venu! Li denove kaptis ŝian brakon, jam pli

forte, kaj ektiris ŝin direkte al la banĉambro. Ŝi ne liberiĝis, sed ŝi plu tenis la malsekan ŝvabrilon en la dekstra mano. Ŝmac! La ŝvabrilo trafis lin meze inter la okuloj. Li malkaptis ŝin sed ŝajnis preta ĵeti sin al ŝi. Ŝi kaptis la ŝvabrilon ambaŭmane kaj refoje batis. Pum! Kaj refoje. Akvo gutis tra la vestiblo.

– Mi ne volas!

Nun li fine cedis. Li viŝis sian vizaĝon kaj silente gapis al ŝi. Poste li turnis sin kaj iris en sian ĉambro.

Sveta preskaŭ ekridis sed poste rimarkis, ke ŝia korpo tremas. Tio tamen pasis, kaj ŝi trankviliĝis iom post iom, dum ŝi plu ŝvabris la plankon vestible kaj kuireje.

Kredeble mi ne havos pli da proponoj de li, ŝi pensis. Same bone. Mi ne ŝatus fari tion eĉ por mil kronoj. Ne kun li.

Je la sekvaj fojoj la majoro estis kiel kutime. Eble iom pli silenta. Sveta ne povis eviti pensi pri li kun la Ĥarkova knabo.

Ŝi scivolis, ĉu li iĝis tia, ĉar li estas oficiro. Mankas virinoj tie. Sed svedaj militistoj sendube ne multe vivas ĉefronte, ĉar ili neniam militas. Tamen nun ŝi sciis, kial li neniam elpaŝis al ŝi. Ne estas pro ŝia manko.

Domaĝe ke la vicpatro ne estas tia. Dio, kiom ŝi stultumas, tiuokaze li ne estus edzo! Tamen, iuj laŭdire ja estas ambaŭemaj.

– Oni maldungis vin, diris Griŝa.

– Kion?

– Tiu virino, ĉe kiu vi purigas, maldungis vin. Ŝi telefonis hodiaŭ.

Sveta tute frostiĝis.

– Kial?

– Ŝi ne diris rekte. Eble ĉar vi provis perfiki pli da mono el ŝia edzo. Estu delikata, damne! Ne lasu la inon ion rimarki!

– Ne frenezu, Griŝa! Ĉu vi pensas ke mi estas tia? Li tion volis, mi rifuzis kaj batis lian muzelon per lavilo.

– Ha ha! Vi estas ridiga, Sveta! Ridige stulta, tio estas. Kompreneble vi petu monon pro tio.

– Mi ne volis. Li estas naŭza.

– Kio do? Vi devas perlabori, ĉu ne? Tiu polvosuĉado ja ne donas multe. Pli bone suĉi kelkajn riĉulojn. Ne malbonas preni monon pro tio.

– Ĉu? Do vi povas iom pagi.

– Ĉu pagi? Kion mi do faras, diable? Vi loĝas ĉi tie, ĉu ne? Kaj la manĝon, viaj moneretoj ne sufiĉas por multo.

– La manĝon vi ŝtelas laboreje! Mi povos refoje meti slipojn urbocentre.

– Certe, sed tio ne facilas. La plej multajn laborojn oni akiras per kontaktoj. Rekomendoj. Pro tio necesas esti iom amika al la mastroj, ĉu ne?

Sveta metis novajn slipojn. Nun ŝi sciis mem skribi ilin, kvankam eble ne

perfekte. Kaj ŝi vere trovis novajn taskojn. Du horojn semajne ĉe maljunulino kun dek milionoj da ornamaj vazetoj. Kaj kvar horojn ĉe familio, sed tio daŭris nur unu semajnon.

Kion Fredrik diris al ŝia edzino? Ĉu, ke Svetlana ofertis al li seksumon kontraŭ pago?

Eble ŝi iru tien por diri la veron, kiam Pia venos de ŝia laboro? Ne, tio maleblis. Ŝi neniam kredus al ŝi. Eble ŝi vokus la policon. Neleĝa alilandano ĝenas la familian vivon.

Ŝi scivolis ĉu Pia jam sendis la paketon. Kredeble ne. Ŝi estis tro okupita dumtage. Same bone. Kial Annuška ludu per uzitaj aĵoj, kiujn tiuj snoboj ne plu volas konservi? Tamen ŝi certe ĝojus kaj ŝatus la ludilojn. Ŝi ne zorgus de kie ili venas.

Ĉu ŝi rezignu kaj reveturu hejmen? Kiel nun estas, ŝi perlaborus same multe en la tekstfabriko kiel ĉi tie. Per kvinobla peno, kompreneble. Sed tiam ŝi almenaŭ renkontus Annan semajnfine. Ja ŝi devus krome toleri la plendadon de panjo. Sveta scivolis, kiel estas al ili hejme en Narva. Se panjo nur estas afabla al la knabino. Certe ŝi estas tia. Ĉiam la nepino pli plaĉis al ŝi ol la propra filino, ŝajnis. Kvankam ŝi furiozis tiufoje, kiam Sveta venis hejmen graveda.

En la lasta tago de marto, kiam ŝi revenis al la apartamento, Larisa kaj Jurij pakis.

– Ni devos foriri.

– Kial?

– Ni nur subluas. La domposedanto ne akceptas nin.

Evidente Griŝa estis sub-subluanto. Ĝi kuŝiĝis surmatrace por pense eskapi de ĉio.

Vespere Griŝa revenis de la restoracio, rifuzis foriri kaj uzis la sekvan tagon por kvereli kun Jura. Vendrede Sveta revenis de la vazo-virino trovante siajn aferojn en du papersakoj en la vestiblo. Ĝi reportis ilin enĉambren. La matraco estis for, do ŝi kuŝiĝis surlite.

Post iom Jura hejmenvenis, puŝis ŝin el la apartamento kaj prenis ŝian ŝlosilon.

– Eble Larisa kaj mi rajtos resti, sed tiam Griŝa kaj vi devos foriri, li diris.

– Do kien mi?– Jen via problemo. Iru al Estonio per via damnita pasporto. Aŭ pozu ĉe stratangulo en la Stokholma urbocentro.

Ŝi sidis ŝtupare ĝis Griŝa venis kaj enlasis ŝin. Tiunokte ŝi kuŝis en lia lito, dormetante kaj re kaj re vekigante pro la kverelado de Griŝa kaj Jura.

– Ni devas foriri, diris Griŝa dimanĉe matene. La mastro ŝanĝos la seruron, kaj oni minacis voki la policon.

– Do kien ni iros?

– Mi dormos ĉe kolego. Vi mem elpensu ion. Mi ne plu povas helpi vin.

Memoru, se la polico demandas, vi restas en Svedio de monato kaj serĉas laboron. Leĝan laboron.

Post du horoj ŝi staris kun du sakoj enmane en la metrostacio de Alby. Trajno alvenis, ŝi eniris kaj sidigis en preskaŭ senhoma kupeo. Sed kien? La sola ŝanco restanta estis la majoro. Sed ĉu li volus helpi ŝin? Se li almenaŭ ŝatus knabinojn! Kial ŝi havu tian malbonŝancon labori ĉe ulo kiu emas je knaboj?


Tamen jen ŝia sola eblo. La restanta mono ne sufiĉus por pramo al Talino. Eble se ŝi ion rakontus al li pri Narva? Ĝi elpensu ion. Ĝi diru, ke caro Petro tie grandioze fiaskis. Ke la Narvanoj sopiras je la bona sveda tempo. Kiel ŝi kapablu diri tion svedlingve? Sed Narva restas ŝia lasta atuto, ĉar ŝi ne estas knabo.

La stacinomoj preterglitas unu post la alia. Baldaŭ ŝi elvagoniĝos ĉe Karla Placo kaj portos siajn sakojn en Narvan Straton. Ĝi estu bona signo, kiel ŝi imagis, unuafaje vidante la nomon.

Sten Johansson

## LIBROJ

### Sveda klasikaĵo



*Ormuzdo kaj Arimano, politika satiro. Carl Jonas Love Almqvist. www.lulu.com 2007. 58 paĝoj.*

Aperis tiu ĉi sveda klasikaĵo en traduko de Gunnar Gällmo, kiu lerte tradukis tiun ĉi politikan satiraĵon.

Almqvist ja estis fama sveda verkisto, sed ankaŭ filozofia kaj politika pensisto. "Ormuzdo" laŭ prairana religio estas la bono. "Arimano" estas la malbono.

Kiu volas mendi la libron, mem serĉu ĝin ĉe [www.lulu.com](http://www.lulu.com), kiu post mendo presos unu ekzempleron de ĝi.

LN

## ANEKDOTOJ

### Pri Zamenhof

En 1905, en la franca urbo Boulogne-sur-Mer, okazis la unua Esperantista Kongreso. Kelkaj urbanoj, precipe knaboj, estis ekscititaj kaj eklernis la Internacian Lingvon.

Matene L.L. Zamenhof iris al la strato por aĉeti lokan magazeton. Li sinturnis al knabo, kiu vendis ĵurnalojn, kaj petis unu ekzempleron – memkompreneble, france. Kiel estis li surprizita, kiam la knabo respondis en la lingvo de Zamenhof: "Parolu Esperante, Sinjoro!"

Klasika esperantista

### Ne manĝu tion

En la jaro 1966 teatra kolektivo de Moskva Universitato scenigis konatan dramon de la poeto Vladimir Majakovskij, "Cimo". Kutime ili prezentis ĝin ruse. Tamen tiutempe oni Esperantigis la dramon por ludi ĝin dum la tiujara TEJO-kongreso en Hungario.

Feliĉe, dum la lasta, tiel nomata ĝĝenerala provludo, ĉeestis Ivo Lapenna, Prezidanto de UEA. Estante slavo, li pli atentis prononcajn erarojn, kutimajn por rusoj. Ruse oni ofte diras -a anstataŭ -o, ekz. Moskvá, anst. Moskvá.

Kiam rusa aktoro replikis: "Kokajon, tamen, pli bone sola manĝi", li eldiris ne ko-, sed kakaĵon, kio ne estas manĝebla. Lapenna tuj proponis anstataŭigi la vorton per "kokidaĵo". Tamen la aktoro estis amatora, do dum la TEJO-Kongreso li eldiris tiun vorton kun -A. La partoprenintoj longe ridegis.

Rusa esperantista

### Envio kaj ilaro

– Kiam niaj najbaroj ekkonis, ke ni aĉetis novajn meblojn, ili preskaŭ ekfreniziĝis pro envio.

– Kio okazis?

– Ili donacis al nia filo libron "Juna meblisto" kaj ilaron.

Rusa

### Sortodiveno

Sortodivenistino dismetas kartojn kaj diras al klientino:

– Ĝis kvindek jaroj vi estos suferanta pro manko de mono.

– Kaj poste?

– Poste vi alkutimiĝos.

Rusa